FN PER ANC 47


# Normanda Esperanto Bulteno

Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie
- Nº 5I - - Oktobro I959 -

Redaktas G.MAMMAUX, 27 Rue Jules Ancel LE HAVRE-S.Mme


## Editorial

La 29-a Normanda Kongreso de Esperanto okazos, tiun jaron, la I5-a kaj la K6-a de Majo en DOMFRONT.

Oni diris ke tiu urbo estas malproksima de la "Norda Normandujo" Tio estas vera, sed estas sama afero por la "Sudistoj" kiam kongreso okazas ĉu en Rouen, ĉu en Havro ... Ne, tio estas nur preteksto !

76 partoprenintoj lastan jaron en Evreux, estas malmulte ! La nombro de la anoj de l'Unuiĝo Normanda estis jam, tuj post tiu kongreso I40; ni ne dubas ke novaj gelernantoj aliĝos; tial, ne estas malsaĝa kalkuli pri 60 novaj aliĝoj kaj almenaù, pri I00 partoprenontoj en DOMFRONT.

Nia amiko VERON senlace laboras por starigi allogan Kongreson. Sabaton okazos konatiĝa vespero kun varietaĵoj kaj dancoj, fakaj kunsidoj. Plue la regiono estas tute ĉarma.

Pluraj grupoj montris al ni ke oni povas plimalaltigi la koston de la vojaĝo luante buson. Se la;prezo de la hoteloj ŝajnas al vi multekosta, vi povos uzi tendon, ĉar estas kampadejo. Kaj, se trapasi unu nokton libera sub ĉielo timigas vin, tiam, venu nur la Dimanĉon sed, nepre, venu!

Ankoraùfoje, mi diras al vi : "Ni iru antaùen !" De nun, starigu novajn kursojn, novajn grupojn .Bonvolo nur estas necesa,ĉar laù decido de la estraro, la Unuiĝo povos (modeste) subvencii novajn kursojn. Kaj se vi malsukcesos, ne estos katastrofo ! Demandu al niaj pioniroj kiom da fiaskoj ili kolektis dum sia vivo; certe multe pli ol sukcesoj! Tamen ili restis viglaj, eĉ kiam la korpo estas iom laca, ĉar ili fidas; ili scias ke ĉiu semo iam ĝermos."Ni semu senĉese" .

Se vi volas ke nia movado propperu, tiam, streĉu viajn fortojn. Zamenhof estis sola ... sed sian tutan vivon li dediĉis, li donis al Esperanto. Ni ne rajtas, ni Geesperantistoj por kiuj Esperanto estas multe pl i ol simpla lingvo, NI NE RAJTAS lasi sen flamo la torĉon, kiun transdonis al ni niaj antaùuloj. Tago post tago, plej necesa estas nia laboro celanta al la "SANKTA HARMONIO ".

KURAĜON kaj ANTAUEN !

Maurice HUET
Prezidanto de U.E.N.

VIDPUNKTOJ PRI LA 44-a UNIVERSALA KONGRESO

Ĉi-jare la Universala Kongreso de U.E.A. okazis en Varsovio, de la I-a ĝis la 8-a de Aùgusto. En tiu kongreso, partoprenis 3.256 kongresanoj, venintaj el 44 landoj de la kvin kontinentoj. Jen granda sukceso por Pollando, ĉar la vojaĝo estis longega kaj multekosta por la plimulto da partoprenantoj. El la alilandaj ĉeestantoj, la pli multaj estis Francoj: pli ol 200, sed kompreneble, Poloj estis proksimume I500.

La kongresejo estis la ege vasta palaco de kulturo kaj scienco Tiu Sovetia konstruaĵo - 36 etaĝoj - estas impona, luksa, pompa, iu vera labirinto : iafoje necesis IO ĝis I5 minutoj por trovi ŝtuparon aù taùgan lifton. Kiel oportuna gvidsigno, tiu alta palaco staras en la centra urbo; I7 tramoj kaj II diversaj aùtobusoj veturigas rekte al tiu kongresejo.

Mi memoras tiom da okazintaĵoj! Ĉiuj kune ŝprucas el mia penso la solenaj inaùguro kaj fermo de la U.K. en la belega, ornamita salonego (sufiĉe vasta por 4.000 ĉeestantoj) estis majestaj, grandiozaj manifestacioj. Merkredon la 5-an, okazis la malkovro de memortabulo ĉe la domo de D-ro Zamenhof,(strato Zamenhofa 5). Pluraj miloj da samideanoj el ĉiuj lokoj en la mondo, kune kun Varsoviaj loĝantoj partoprenis tiun solenan, kortuŝan ceremonion. S-ro Baghy memorigis la vivon kaj la idealon de Zamenhof, kreinto de la internacia lingvo Esperanto; poste reprezentantoj de la kvin kontinentoj mallonge parolis, montrantaj al ĉiuj, ke la celo de nia Majstro paŝo post paŝo trafita baldaù fariĝos. Tiu longega procesio fine direktis sin al la tombejo, kaj preterpasis la tombon en silenta omaĝo. La sekvantan tagon per speciala trajno, multe da kongresanoj veturis ĝis Bjalistok, la naskiĝurbo, kie staras monumento memore al D-ro Zamenhof. Tie okazis aliaj oficialaj manifestacioj kiuj ankaù estis filmataj.

Aliajn tagojn, mi hontas tion konfesi, mi kelkfoje opiniis la paroladon tro teknikaj por mi... Aliflanke, mi entuziasmiĝis ĉe ĉiu teatra aù muzika vespero. Eĉ mirigis min la aktoroj, kiuj ludis en Esperanto la teatraĵon :" Friponaĵoj de Skapeno ", eĉ ankaù la artista grupo pri folkloraj dancoj. Sento ja kvazaù antaùgusto pri la belega programo de la postkongresaj ekskursoj, tra Krakovio aù Zakopane.

Mi sincere opinias, ke bonŝance okazis por ĉiu kelkfoje kunvenoj malpli interesaj.. tio ebligis al ni ĝui iom da libera tempo, aliamanieretiom malofta, por interparolado kun alilandaj samideanoj, afero tre grava kaj ŝatata de ĉiu dum iu ajn kongreso. Jen estis mia unua internacia kongreso! Mi memspertis la utilon de Esperanto, parolante kun alilandanoj, kaj mi travivis la facilecon de privataj kontaktoj dank'al kiuj oni tiom rapide simpatias inter frendaj samideanoj.

Mi konatiĝis kun polaj geedzoj, kiuj invitis min kaj mian edzon viziti ilim post la kongreso. Ni estis akceptataj de tiuj polaj gastigantoj [illegible] neforgeseblajn tagojn. Mi povas aserti, ke amikeco devenas nek de la nacio, nekvde la lingvo, nek de la racio, nek de la religio... sed ke ĝi estas nur humana, persona afero, kiam homoj povas en paco sperti, ke ili ĉiuj estas similaj fratoj; sed la ebleco paroli saman lingvon permesas kaj plifaciligas la kontaktojn, kaj tiel, pliproksimigas la korojn.

M.COLLEU

# E S T O N I A J   L E G E N D O J

-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-

En la mondo vivas du ĉielaj estaĵoj: junulo de matenruĝo -Koit kaj junulino de vesperruĝo -Hamarik.

Koit devas weki la sunon, ke ĝi laborus kaj brilus al homoj; Hamarik devas wespere meti la sunon al lito, ke ĝi ripozus kaj dormus.

Ili ambaŭ bonege plenumas siajn taskojn. La gejunuloj ekamis unu la alian, sed nur dum printempo kaj somero ili vidas unu la alian, precipe dum Majo kaj Junio. En Junio, kiam ili povas sin reciproke vidi je pli mallonga distanco, iam okazas ke ili forgesas siajn taskojn kaj tiam en unu rando de ĉielo estas ruĝo de vangoj de Hamarik kaj en alia ĉielrando ruĝiĝas vangj de Koit.

Nur dum nokto de Jaani ( la 24-a de junio estas la plej luma kaj mallonga nokto en Estonio) ili povas momente renkonti. Ili sin ĉirkaŭpremas kajdenove devas rapide disiĝi.

Unufoje, ili ĉion forgesis kaj ilia renkonto daŭris dum kelkaj momentoj. Tion rimarkis la plej supra estaĵo Avo, kiu koleris, sed baldaŭ li al gejunuloj pardonis. Eĉ Avo permesis ke ili povos labori kiel geedzoj, sed Koit kaj Hamarik tion ne akceptis. Pli bele al il estis resti por ĉiam kiel fianĉo kaj fianĉino.

<u>Legendo de la filiko</u>

La filiko ekfloras nur unufoje po jaro kaj dum la nokto de Jaani. La floro de filiko estas fabele belega, sed trovi ĝin estas tre malfacila. Multegaj homoj ĝin serĉis, sed trovis ĝin tre malmultaj. Kiu trovas floron de filiko, trovos dum sia tuta vivo grandan feliĉon

Sendita de nia amikino Milvi KOPLUS de TALLINN (Estonio)

La 44-a Universala Kongreso

La 44-a Universala kongreso de Esperanto okazis en Varsovi ĉe la belega kaj pompa palaco de kulturo kaj scienco . Ĉirkaù 3.500 kongresanoj el 45 malsamaj landoj, ĉeestis, kaj oni povas diri, ke estis la unua granda kongreso, de la lasta mondmilito, kien alvenis popoloj vivantaj aliflanke de la ferkurteno.

Perfekta organizado, je la skalo de la Palaco: ĉio estis antaùvidita por agrable akcepti la samideanojn, kaj kontentigi ilin en ĉiuj aranĝoj. Ĉiuj laboroj estis plenumitaj malgraù speciale vastaj tagordoj kiuj eĉ devigis organizi plurajn kunsidojn samtempe.

Memortabulon oni inaùguris ĉe la domo, kie mortis nia Majstro Strato Zamenhof. Poste, vizito al la Hebrea tombejo, kie silente kaj malrapide ĉiu preterpasis la tombon, konatan de ĉiuj esperantistoj, preskaù inunditan per multaj florkronoj de diversaj esperantistaj organizaĵoj.

La balo kiel kutime, multe sukcesis. La ekskurso al la lulilurbo de Zamenhof, Bjalostoko, montris al ni la bonegan akcepton de la urbestraro kaj de la enloĝantoj. Enmasonigo de la unua ŝtono de estonta monumento memore al la kreinto de Esperanto, sur urba placo; malkovro de marmora memortabuloĉe la loko, kie staris la naskiĝdomo de Li; inaùguro de lernejo nomita je la nomo de D-ro Zamenhof. Nenio mankis : flagoj, banderoloj, skoltaj vicoj sur la perono de la stacidomo, orkestro, k.t.p. unuvorte, simpla sed vere sincera akcepto.

Por montri ke la pola registaro sin interesas pri Esperanto, la vic-ĉefministro S-ro Piotr Jaroszewicz kaj la vic-ministro de kulturo kaj Arto S-ro Rusinek ĉeestis al la solena malfermo de la kongreso, kaj ia vespero, la vic-ĉefministro mem invitis la tutan kongresanaron al impona bankedo.

Pluraj artaj kaj teatraj manifestacioj okazis :"Pigmaliono" de Bernard Shaw, "Friponaĵoj de Skapeno" de Molière, kaj aliaj, kie oni povis admiri la altvaloron de la bulgaraj aktoroj.

Tiu neforgesebla kongreso, ho ve ! finis en apoteozo, kaj ĉiu disiris kun bedaùro, promesante al siaj amikoj sin revidi venontan jaron, en Bruselo.

Dum mia reiro, mi havis okazon halti en Berlino, por viziti la urbon, en ĝiaj du partoj, orienta kaj okcidenta, kaj ĉeesti al kunveno de la Esperantista grupo de granda Berlino. Mi tie ricevis varman akcepton.

E.PERMANNE

★EKZAMENO★

Listo de la sukcesintoj je la ekzameno kiu okazis en Rouen :

| | | |
|---|---|---|
| Atesto pri lernado : | S-ino BUNOUT | S-ro MANSIRE Bernard |
| | S-ro GUERRE France | S-ro ROUSSIER Henri |
| | S-ro LOISEL André | S-ro THILLAIS Adrien |
| Atesto pri Supera lernado | S-ino COLLEU | S-ro LEPRETRE R. |
| Atesto pri kapableco | S-ro LETENDRE | S-ro MAMMAUX |

S-ro JOUIS, 67 Rue Georges Mugnier ROUEN sendos la diplomojn kiam oni ilin demandos.

ESPERANTISTA EDZIĜO

Kiam fraŭlo Esperantista renkontas fraŭlinon Esperantistan, pri kio ili parolas? Pri Esperanto, kompreneble, sed ankaŭ pri aliaj aferoj. Estas tiel facile interŝanĝadi ideojn kiam oni flue parolas Esperanton! Kaj, paŝo post paŝo, Esperanto iĝas ... edz-peranto, diras Raymond SCHWARTZ!

Verŝajne estas tia...adventuro kiu kondukis niajn geamikojn Pierre POTTIER, Vic-Prezidanto de J.E.N. kaj Claudine MARIE, membro de l'estraro de J.E.N. antaŭ alia samideano: Pastro BECUE, la 5-an de Septembro en la preĝejo Sankta Mikaelo en Havro. Kvamkam ili estas ambaŭ Normandaj, ili respondis: "Jes". Tial nombraj estis la Esperantistoj por gratuli la novajn geedzojn.

Reprezentis l'Unuiĝo Normanda, Prezidanto HUET kaj Sekretario MAMMAUX; ankaŭ ĉeestis: S-ro GASSE, Prezidanto-kreinto kaj F-ino AMIARD Aktiva Vic-prezidantino de la Havra grupo, S-ino NOEL, de la Laborista grupo, S-ro PERMANNE, Prezidanto de la Fecampa grupo, k.t.p.....

Niajn gratulojn kaj feliĉon al la nova paro. Sed ne estas sen malgajeco ke la Fecampa kaj Havra grupoj lasas niajn geamikojn starigi sian hejmon ĉe la fino de la Departemento, en Blangy-sur Bresles. Sed eble, naskiĝos baldaŭ nova grupo en Pays de Bray .

ROUEN : La 22-an de Aŭgusto okazis en"Café de la Cour" kunvenon por akcepti germanan samideanon. Tre bonmemora renkonto.

FECAMP : Ni funebras kaj kondolas . Komence de Aŭgusto forpasis S-ino DUPRE, fratino de nia sindonema Kasistino Simone JILLET.

Ankaŭ, fine de Aŭgusto mortis S-ro VAILLANT, patro de S-ro Maurice VAILLANT, nia ĉiama kunlaboranto pri ekspoziciaj aranĝoj.

Al familioj, niajn sincerajn kondolecojn.

Vojaĝo Nederlandon. Post lasta nacia konkurso de S-ro Pierre DELAIRE, 4 Fecamp-aninoj gajnis premion: unu semajna restado en Nederlando : S-rino F.PERMANNE, F-ino S.JILLET, F-ino M. LACHEVRE kaj juna R. CLEMENT, 9 jaraĝa. Pro freŝa funebro, F-ino JILLET ne partoprenis al la vojaĝo, ankaŭ F-ino LACHEVRE, pro translokiĝo pri sia profesio. S-ino PERMANNE kaj F-ino CLEMENT ambaŭ iris Zaandam-on, apud Amsterdamo kaj revenis tute ravitaj pri la vojaĝo kaj la bonega akcepto de iliaj gastantoj.

Vizitintoj en nia urbo. Dum Julio, la grupo plezure akceptis ĉarman jugoslavan paron: Ges-oj Zivko IVANOVIC -POTTIER, kiuj libertempis en familio en Fecamp.

Ankaŭ, la 22-an de Aŭgusto, la delegito de U.E.A. en Arnhem S-ro E.J. WOESSINK kaj sia familio, estis en Fecamp. Dum la tuta vespero ankaŭ la morgaŭa tago matene, ili estis gviditaj kaj helpitaj de S-ro PERMANNE, Vic-delegito de U.E.A. en la urbo.

LE HAVRE : Tiujare la neŭtrala grupo organizas 4 kursojn : unuagrada kaj duagrada kursoj gvidataj de S-ro MAMMAUX kaj S-ro HUET. Siaflanke S-ino LAVALLEE gvidos 2 kursojn por geinstruinstoj, kaj akceptis ankaŭ gvidi perkorespondan kurson.

S-ino BUNOUT, anino de la grupo ricevis la ordenon de Chevalier des Palmes Académiques. Ni kore gratulas.

Lastan someron la grupo kunvenis dufoje por akcepti jugoslavajn samideanojn. Laborista grupo invitis nin ĉe Rospabu por renkonti fremdan esperantiston.

Por multaj tiuj renkontoj ebligis paroli nian lingvon kun fremduloj, kaj tiu travivita sperto estis tute konvinka.

* * * * *

LA ANGULO DE LA PROPAGANDISTO

Si vous avez des amis philatélistes, offrez leur des cartes du Pont de Tancarville avec le timbre et l'oblitération Ier jour.

Adressez les commandes en joignant I00 Fr par carte, ainsi qu'une enveloppe timbrée pour la réponse à S-ro Maurice HUET, 63 Bld François Ier, LE HAVRE

Le prochain Congrès Normand sera placé sous le signe du Tourisme. Pourquoi ne pas commencer une petite caisse de congrès en mettant de côté 50 ou I00Fr par semaine. au Mois de Mai, pas de soucis financiers pour visiter la riante Basse-Normandie.

* * * * *

FABLOJ DE LESSING ( el Legolibreto de Borel )

Leono, bovo, kaprino kaj ŝafo : Bovo, kaprino kaj ŝafo kuniĝis kun leono kaj foriris kune por ĉasadi. Kiam ili estis mortigintaj en la arbaro belan kaj grandan cervon, la leono ĝin dividis en kvar partojn kaj diris:"La unuan parton prenas mi, ĉar mi estas leono kaj reĝo de ĉiuj bestoj; la dua estas mia, ĉar mi estas pli forta ol vi, la tria estas ŝuldata al mi kiel mia parto de la ĉaskaptaĵo; kaj kiu volas havi la kvaran, tiu devas batali kun mi pro ĝi." La aliaj devis do foriri senigitaj, kaj la leono gardis la tutan kaptaĵon por si.

Herkuleso : Kiam Herkuleso estis akceptata en la ĉielon, li, el ĉiuj dioj, unue salutis Junon. La tuta ĉielo kaj Juno miris pri tio. "Al via malamikino, oni kriis al li, vi montras tian preferon?" - "Jes, al ŝi mem, respondis Herkuleso, ĉar nur ŝiaj persekutoj donis al mi okazon, fari la agojn, per kiuj mi meritis la ĉielon." La Olimpo konsentis pri la respondo de la nova dio, kaj Juno repaciĝis.

# Domfront (Orne)

Quelques esprits chagrins ont insinué que nos congrès régionaux n'apportaient pas à la cause de l'Esperanto des élements spectaculaires de propagande ...

Ceci est vrai, car si de telles réunions constituaient de décisives victoires ... nous en organiserions volontiers tous les mois.


Il faut croire toutefois, que ces manifestations ne sont pas inutiles puisqu'elles permettent d'affirmer notre "présence" (favorablement soulignée dans la presse) et que rien ne nous empêche de leur donner un caractère plus large sous forme de réunions publiques d'information ...

Dans cet esprit le prochain congrès Normand aura lieu à DOMFRONT les I4 et I5 Mai I960; il devra être un succès pour soutenir l'effort de mos amis de Basse-Normandie, et je fais d(ores et déjà appel à une large participation de tous les Espérantistes. /

Le parcours, un peu plus long qu'à l'ordinaire, prouve que nous "allongeons le tir" - que par ailleurs nous voulons joindre à la réunion de travail les joies d'une séduisante échappée touristique.

DOMFRONT, ville médiévale au riche passé historique mérite votre visite et nos amis qui nous y accueilleront seraient encouragés par notre adhésion de principe, sans que nous ayions à redouter le vieil adage (heureusement)périmé :

DOMFRONT Vill' d'malheu'
Arrivé à midi ...
Pendu à un' heu'
Seulement pas l'temps d'dainer ...



J'ajouterai que notre action s'exercera activement sue le Corps Enseignant, que les Organisateurs rencontrent une bienvaillante compréhension de la Municipalité & du Syndicat d'Initiative et que le jeune groupe local, officiellement constitué, élargit l'horizon de notre publicité.

Selon votre attitude vis-à-vis du 29e Congrès, l'ESPERANTO fera, en Sud Normandie un "boom" ou un fiasco . Ecrivons tout de suite à M. VERON, place de la Petite Bruyère

Disons à DOMFRONT que c'est d'accord ...

Marcel BOSC.
Esperanto-Turisma Servo
(Normandie)

# I N F A N A Ĵ O J  ( Nº 3 )

BROŜUROJ VERKITAJ KAJ ILUSTRITAJ DE LA INFANOJ

-Eldonejo de la moderna franca lernejo CANNES (A.M.) -

..................

## HISTORIO DE LA KNABETO SUR LA MONTO (Sekvo)

### IUN NOKTON .....

Justin kaj Elisa kuŝas.

Estas tre mallume en la lignodomo, ĉar ne ekzistas fenestro; ili aŭdas paŝbruon sur la vojeto....

Homoj venas ....

Kiu scias ? Ŝtelistoj ! eble rabistoj !

Jen ili estas antaŭ la pordo; ili frapas : Pan! pan! per dika bastono; pan! pan! per la piedo ....

Justin sin kaŝas sub la kovriloj ....

Ho! ne bezonas timi. Estis turistoj foririntaj frue por iri al Ascension lago. Ili estis malvarmaj, ili volis trinki tasegon da varma lakto.

### VESPERE SUR LA MONTO

Vesperiĝas.

Estas la momento, kiam oni melkas la bovinojn en la malfermitaj bovinejoj.

Elisa filtras la lakton en grandan kupran kaldronon, kaj Justin vespermanĝas per plenpelveto da tiu lakto parfuma kiel la montaj floroj, kiujn la bovinoj manĝis la tutan tagon. Poste li enlitiĝas.

Li aŭdas la venton blovi kaj vagi sur la monto.

Kelkfoje ĝi eniras tra la malbone kunigitaj tabuloj de la pordo. Justin ĝin sentas sur sia vizaĝo.

Li preskaŭ timas....

### LA MONTAJ VOĈOJ

Justin konas ĉiujn montajn voĉojn : la bruon de la vento en la valoj, la sonon de la sonoriletoj pendigitaj je la koloj de la bovinoj kaj la knaradon de la akridoj sur la herbo. Li konas ankaŭ la sovaĝan blekadon de la fazanoj kaj de la urogaloj, kiuj peze ekflugas el tufo de juniperoj, kaj la akran fajfadon de la ĉamoj kaj de la marmotoj, sur la rokoj, supre.

Kelkfoje Justin restas longe aŭskultante la montajn voĉojn paroli al li ĉiuj samtempe.

(Tradukis el la franca : S-ino VINCENT Av. de Gaulle, LES ANDELYS Eure)